

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Monique Arnaud

Mireille Grosjean

Isikawa Tieko

Katalin Kováts

Stefan MacGill

Alessandra Madella

Mónika Molnár

József Németh

Radojica Petrović

Roberto Pigo

Gilles Tabard

Renée Triolle



ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN)	3
Mónika MOLNÁR: <i>Freinet-pedagogio – Parto III</i>	4
Alessandra MADELLA: <i>Pri la instruado al mil gestudentoj ĉe la Artkolegio de Kunming (Ĉinio)</i>	12
3 gravaj eventoj en rilato kun UNESKO (R.TRIOLLE, M.ARNAUD, M.GROSJEAN) 16	
<i>Paŝoj al plena agnosko</i> (Mireille GROSJEAN)	19
<i>EDUKADO AL PACO laŭ Lech WAŁĘSA</i> (Renée TRIOLLE)	21
Kongresaj informoj, aliĝilo (Radojica PETROVIĆ).....	23
Konkursoj (Gilles TABARD, Roberto PIGRO, Mireille GROSJEAN).....	27
El la landoj kaj sekcioj (HU, JP)	30
<i>20 kuraĝaj gestudentoj laboras por akiri diplomon [...] (M. GROSJEAN)</i>	32
<i>AMO – ĉe viv-eko aŭ viv-daŭrigo?</i> (Stefan MACGILL)	33
<i>Ekparolu! okazigis 850 parolsejojn</i> (Katalin KOVÁTS)	34
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj	36
Adresaro de la Sekciestroj, Reprezentantoj, Kontaktpersonoj	38

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Rilatoj kun UNESKO kaj FIPLV. Observanto de ILEI ĉe UEA. Informado al ekstero. Ekzamenoj.

Vicprez.: GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitata agado.

Sekretario: Emile MALANDA NIANGA. P. O. BOX 2787 Cape Town 8000, Sud-Afriko. <emalandan@yahoo.fr>, <ilei.sekretario@gmail.com>. Kontakto kun sekcioj. Koleghelpa Kaso.

Vicsekr.: Elena NADIKOVA. ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>. Lerneja agado. Eo-centroj.

Estrarano pri financoj: William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Kongresoj de ILEI, rilatoj kun TEJO, retaj aferoj, „Interkulturo”.

Estrarano: Ivan COLLING. Cx.P. 1701, Ag. Mal. Deodoro, Curitiba, PR. BR-80011-970, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Universitata agado.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono,
Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio,
Università degli Studi di Roma
„La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute,
Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio,
Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iłona Koutny, Pollando/
Hungario, Uniwersytet im.
Adama Mickiewicza w
Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного
Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolkovrilo: La gelernan-
toj de la lernejo „*La Granda*
Ursino” ludas ludon, en kiu ne
estas malvenkantoj, dum ilia
junia kampadumo (vd. p. 4)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Jen denove tre bunta revuo por vi.
Aperas malferme la tria parto de la
detala prezento de Mónika Molnár. Ni
ĉiuj povas trovi inspiron legante pri
Freinet.

Same ni povas trovi inspiron legante la
artikolon de Alessandra Madella pri la
instruado al mil ĉinaj junuloj. Eble tiaj
situacioj oftigoj estontece.

La Ĝenerala Konferenco de UNESKO
okazis en oktobro-novembro 2017 kaj
altiris la atenton de la tuta mondo. Nia
teamo el kvin observantoj estis multe pli
ol observantoj ; ili estis efikaj agantoj en
la koridoroj kaj salonoj de la ĉefa sidejo
de UNESKO en Parizo. Tri raportoj
ebligis al vi flari la etoson de tiu grava
evento.

La dekan de decembro mi estis en Parizo
por partopreni AMO-seminaron de
UEA, kune kun gravuloj de UEA kaj de
TEJO. Ni povis skizi la fareblajn paŝojn
por desegni padon ĉe UNESKO por nia
kara lingvo.

Fine de tiu ĉi numero vi ekscios ne ĉion,
sed multon pri nia pinta evento de 2018:
nia madrida kongreso. Ni tre antaŭĝojas
revidi vin en tiu okazo !

Ni deziras al vi agrablan legadon!

Mireille GROSJEAN
Prezidanto de ILEI

Freinet-pedagogio – Parto III

La praktiko de la teorio

- La Freinet-pedagogio en vera lernejo –

de Mónica MOLNÁR (Svislando/Hungario)

Pri la aŭtoro




MOLNÁR, Mónica – Diplomita instruisto pri informadiko, italaj lingvo kaj literaturo, kino-pedagogio, Esperanto kaj interlingvistiko, regula kunlaboranto de la revuo Juna Amiko, de la porinstruista retpaĝaro edukado.net kaj rajtigita ekzamenanto por la KER-ekzameno kaj la ILEI/UEA-ekzamenoj. Vivas aktuale en Svislando, kie de pluraj jaroj ŝi instruas en la svisa lernejo „La Grande Ourse”, i.a. ankaŭ Esperanton al 6-16-jaraj gelernantoj.

Resumo al la 3-parta artikolserio

La eduka sistemo suferas kaj bedaŭrinde suferigas siajn aktorojn, kvankam ne mankas bonvolaj homoj, kiuj serĉas iun solvon. La problemo ne estas novdata, sufiĉas retrorigardi kaj vidi eminentajn pedagogojn, kiel Célestin Freinet, kiuj luktis por plibonigoj. La Freinet-pedagogio aplikas diversajn bone ellaboritajn teknikojn, el kiuj tiu de la lerneja korespondado estas unu el la plej ekspluateblaj de la Esperanto-instruistoj. La svisa lernejo, „La Granda Ursino” apartenas al tiuj malmultaj lernejoj, kiuj sekvas la pedagogion de Freinet. Kunplektiĝante kun la Freinet-pedagogio kaj kun ĝiaj teknikoj, Esperanto havas gravan rolon kiel la unue lernata lingvo de ĉiuj tieaj gelernantoj.

Kiel kunligiĝas la vojoj de la pollanda Zamenhof, la franca Freinet kaj la svisa lernejo „La Granda Ursino”? Zamenhof revis pri lingvo, kiu apartenos al ĉiuj siaj uzantoj. Freinet opiniis, ke lingvojn oni lernas ne por scii, sed por uzi. Nia lernejo, „La Granda Ursino”, praktikas iliajn principojn.



La lernejo „*La Granda Ursino*” malfermis siajn pordojn en 1983, en la franclingva parto de Svislando, en La Chaux-de-Fonds. Ĝin fondis la gepatroj de la tiamaj gelernantoj, kiuj volis, ke la lernado ne estu iu ŝarĝo por la infanoj, sed ke ili havu emon iri lernejen, ĉar ŝatante tion, kion oni faras, la atingoj estas pli

bonaj kaj efikaj. Farante ion kontraŭvole, eĉ atingante momentajn rezultojn, la vera scio tamen restas tre malproksima. Ili volis, ke iliaj gefiloj alproprigu la respekton de si mem, de la aliaj, de la materialoj; ke ili alproprigu bonan konduton en interhomaj rilatoj. Estas tre granda akcento sur la respekto, la aŭtonomio kaj la aktiveco. Ili simple volis prepari siajn junulojn al la vera, aktiva, demokrata kaj respekto-plena vivo. La kunlaboro inter gelernantoj – instruistoj – gepatroj estas esenca parto de nia lernejo, ĝia bona funkciado forte dependas de la ĝusta rolo de tiuj tri pilieroj.

„*La Granda Ursino*” estas unu el tiuj malmultaj lernejoj, kie oni praktikas la Freinet-pedagogion. Kvankam ekzistas aliaj lernejoj kun similaj tendencoj kaj klopodoj, ĉefe en Finnlando, tamen ili ne nepre sekvas tiun ĉi pedagogion. La plej okulfrapa diferenco kompare kun multaj tradiciaj lernejoj estas, ke la klasĉambro ne similas al klasika klasĉambro, ja la gelernantoj havas siajn skribotablojn dise en la ejo, grupiĝinte kun tiuj, apud kiuj ili volas labori. Estas nur du grupoj kun diversaĝaj gelernantoj, la grupo I (12-16-jaraj) kaj la grupo II (6-12-jaraj). La grupoj nomiĝas laŭ siaj etaĝoj por eviti la malbone akceptitajn distingojn „grandaj” kaj „malgrandaj”. La plej orelfrapa diferenco estas la malĉeesto de sonorilo, kiu markus 45-minutajn lernperiodojn aŭ ion ajn. Ni laboras surbaze de projektoj en kiuj involviĝas la diversaj scioj pri matematiko, gepatra lingvo, sciencoj, artoj ktp. La projektojn foje ni elektas laŭ kriterioj, foje ili doniĝas tute nature aŭ el iu aktualajo venanta el la ĉiutaga vivo aŭ el personaj cirkonstancoj.

Nia aktuala temo prezentigis per granda donaco, kiun ni ricevis de s-ro Hori Jasuo dank'al niaj personaj kontaktoj pere de Esperanto. Ni ricevis grandan kompletan de tradicia, japana puparo, tiom grandan, ke necesis pluraj grandaj pakaĵoj por povi sendi ilin. Kiam ni malfermis la skatolojn, la infanoj estis tute ekscititaj kaj ne ĉesis demandadi nin pri la unuopaj pecoj, kio ili estas, kion ili simbolas. Sincere dirite, 1-2 gelernantoj sciis pli ol ni, la instruistoj, ĉar ili estis jam forte altiritaj de la japana kulturo pere de aliaj ŝatokupoj. Tiu granda intereso puŝis nin ekspluati la scivolemon de la gelernantoj kaj valorigi la sciojn de tiuj 1-2, proponante projekton pri Japanio. Kompreneble ni ne havis tute pretan materialon, libron aŭ ion ajn pri la temo, sed ne gravis, ĉar unuflanke en tiu momento ĉiuokaze ni estis farantaj alian projekton, kiun ni devis unue fini, aliflanke ni tre malofte uzas la „antaŭklasan instrumentodon”, kie la instruisto parolas kaj la gelernantoj nur aŭskultas.



Por la sekva lernoĵaro ni preparis tem-proponojn, informiĝis pri alireblaj materialoj kaj luprenis aŭ akiris ilin. Ni serĉis kaj invitis personojn, kiuj aŭ profesie aŭ laŭinterese estas konsiderataj kiel specialistoj pri la diversaj



temoj. Post la tem-proponoj, la gelernantoj povis elekti tiujn, kiuj pleje interesas ilin. Formiĝis grupetoj de duopoj (ĉiam unu pli juna kun unu pli aĝa) kaj komenciĝis la esplora kunlaboro. Por tio ili uzis librojn, periodaĵojn, filmetojn, materialojn ricevitajn rekte el Japanio, demandaron kompilatan kaj adresitan en Esperanto al Hori Jasuo kaj la

vastajn konojn kun multaj fotoj de Mireille Grosjean, kiun ni invitis kaj por prelegi pri Japanio al ĉiuj, kaj por individuaj kunsidoj kun la duopoj.

Kutime, kiam la grupetoj bone pristudis siajn temojn, ni okazigas preleg-seriojn, ene de kiuj ili prezentas la akiritajn konojn al la aliaj. La




prezentitajn tekstojn, kiujn ili mem kompilis pli frue baze de la akiritaj informoj, post korektado ili kopios kaj ilustras en la tiel nomata „Bela-Kajero”. En tiun kajeron eniras ĉiuj dumjare traktitaj temoj de la projekto aŭ aliaj gravaj travivaĵoj. Ni povas konsideri ilin „inversaj lernolibroj”, ĉar en ili



estas ne lernenda materialo, farita de plenkreskuloj kaj ricevita komence de la lernojaro, sed lernita materialo, finkompilita de la gelernantoj mem por la fino de la lernojaro. Mi povas aserti, ke ne nur la nomo estas „bela” de tiuj kajeroj.

Ofte okazas, ke el elektitaj tekstoj la gelernantoj kompilas ankaŭ lernejan ĵurnalon. En la tempo de Freinet tio okazis per uzo de propra presilo kaj kvankam ni eĉ havas tiajn presileton, ni tamen faras tion per komputiloj. Ĉu tio signifas, ke ni ne estas fidelaj al la teknikoj de Freinet? Ne, tute simple ni adaptas ilin al nia epoko, al niaj ebloj. Ni certas, ke ankaŭ Freinet utiligintus komputilojn, se ili ekzistintus jam en lia epoko. Ja li mem parolis pri tiu metiisto, kiu klopodas modernigi sian atelieron kaj kiel li, ankaŭ ni povas provi modernigi la ilojn de la lernejo, adaptante aŭ readaptante la lernejon al ĝia ĉirkaŭaĵo por pli bona efiko de niaj investoj.



Estus malfacile detali ĉiujn paŝojn de tiu ĉi instru- kaj lern-procedo, tamen mi esperas, ke la ekzemploj povas doni al vi almenaŭ ideon pri tiu ĉi aliro al la scioj.

Labori per projektoj ne estas la nura formo por akiri sciojn. Paralele disvolviĝas ankaŭ individuaj laboroj direktitaj pere de laborplanoj, ekzekuciitaj tra memkorekteblaj taskofolioj (speciale kreitaj por la Freinet-pedagogio), personaj, libertemaj tekstoj, desegnoj, manlaboroj.



La gelnantoj lernas ankaŭ kuiru, de la unua paŝo de tiu procedo ĝis la lasta, sen havi apartajn lecionojn pri kuirado. Kiel tio eblas? La pli junaj (10-12-jaraj) elektas la farotajn receptojn kun siaj gepatroj (*gepatra kunlaboro*), la pli aĝaj elektas tiujn jam ili mem en la lernejo (*aŭtonomio*) konsiderante kelkajn regulojn pri nutraĵeroj, laŭlokeco, laŭsezoneco ktp. (*utilaj konoj por la konscia ĉiutaga vivo*). Poste ili reskribas la receptojn: la pli junaj rekopias mane, la pli aĝaj reformulas kaj tajpas ilin en tabula formo (*tekstokompreno, gepatra lingvo, komputilaj scioj*). La sekva paŝo estas la

kalkuloj de la ingredienc-kvantoj por ĉiuj kunmanĝontoj (19-23 personoj) kaj de la prezo de la ingrediencoj, kiu ne transpasu donitan buĝeton (*matematiko, ekonomio, buĝeto*). La gelnantoj devas ekzerci sin pri la receptoj hejme, komence kun eventuala helpo ĝis la sukceso sen helpo kaj ili estos pritaksitaj fare de la gepatroj (*gepatra kunlaboro*). La aĉetaĵojn devas fari la gelnantoj mem (*konscia elekto de varoj, manipulado de mono, konsciiĝo pri pezoj, matematiko*). La fina fazo estas la kuirado mem en duopo, sen plenkreska asisto. Havante unu horon kaj duonon je dispono, ili devas prepari la manĝaĵon por dudeko da personoj (*organizado, kunlaboro, respondeco, praktiko, solidareco*). Kompreneble ili devas ankaŭ ĉion purigi kaj lasi la kuirejon en ordo, same kiel ili mem purigas ĉiusemajne la klasĉambrojn kaj la komunajn lokojn laŭ difinita plano (*praktiko, respondeco, organizado, respekto*). Eble superfluas aldoni, ke tiu-maniere ni ne vere havas problemojn pri disciplinado, ja ĉiuj volas, ke ilia laboro estu respektata kaj tio komenciĝas per la respekto de la laboro de la aliaj. Ĉu vi rimarkis kiom da terenoj ni tuŝis per „simpla” kuirado?



En „*La Granda Ursino*”, la unua fremda lingvo kompreneble estas Esperanto. La kialo evidentas pro la avantaĝoj, kiujn ni traktis en la antaŭaj numeroj. Pere de Esperanto ili havas sukceso-senton tre-tre frue kaj ili akiras aŭ reakiras memfidon. La lernado de Esperanto helpas ne nur la aliron de la sekvaj lingvoj, sed helpas pli bone kompreni eĉ sian propran lingvon. Esperanto estas instruata ankaŭ pro aliaj kialoj, ĉar per ĝi eĉ la logiko en matematiko estas helpata, per ĝi oni tuŝas ankaŭ interkulturon, geografion, historion, civitanekon. Oni devas klopodi ankaŭ kapti ĉiujn okazojn, kiel Freinet faris siatempe, por praktiki la lingvon diversterene, diversmaniere. Ekzemple kiam venas esperantistaj gastoj en la regionon, ni kaptas la okazon fari intervjuon kun ili, aŭ prezentigi vive iliajn kulturojn, tradiciojn.

Krom tio, kiel Freinet korespondigis siajn gelernantojn, ankaŭ la ĉi tieaj gelernantoj korespondas kun aliaj klasoj, aktuale kun Benino, Japanio, Urugvajo, Pollando kaj iam kun Manksujo kaj Brazilo. La gelernantoj havas korespond-kajeron, en kiun unuflanke ili gluas la ricevitan leteron, aliflanke skribas la respondon. En tiu kajero mi korektas iliajn respondojn kaj ili rekopias tiujn korektitajn tekstojn sur belan paperon, faras desegnaĵojn aŭ aldonas fotojn, bildojn, poŝtkartojn, monerojn ktp. por sia korespond-partnero. Estas ĉiam interese kaj entuziasmige ricevi respondojn el foraj landoj, kie la kutimoj tiom malsamas de la niaj.

La Esperanto-lecionoj kutime estas viglaj kun tre diversaj aktivecoj, ni havas sufiĉe da libroj libere alireblaj al la gelernantoj kaj jam de kelkaj jaroj ili aktive partoprenas en la Esperanto-Sumoo, kiu konsistas el legado de libroj. Ĉefe la pli grandaj gelernantoj preskaŭ ĉiun duan monaton engaĝiĝas por legi dum 2 semajnoj ĉiutage difinitan kvanton de paĝoj en iu elektita libro. Krom la libroj, ankaŭ la instruista kofro estas plena je materialoj, ĉefe mem-faritaj laŭ la pormomentaj bezonoj.

Interesa kaj valora materialo estas ankaŭ la „kamiŝibajo”, japana bild-aŭ paperteatro, kiu uzas specialan aparaton montranta la bildojn de la rakonto al la publiko kaj la legeblan tekston al la rakontanto, kiu troviĝas malantaŭ ĝi. Tiun ĉi teknikon ni ne uzas regule, nur de tempo al tempo, ĉar ĝia preparado bezonas multe da tempo. Kompreneble nun, en la japana projekto ĝi tre aktualas. La unua tiutipa kreado okazis en 2008, kiam ĉiuj gelernantoj preparis sian propran historion kaj kune ni





preparis unu enorman, akvarelan kamiŝibajon, kiun ni prezentis publike, en Esperanto en la loka biblioteko, kadre de kultura programo de la Svisa Esperanto-Societo. Dum la preparado la gelernantoj inventas rakonteton, skribas kaj ilustras ĝin laŭtape elektante laŭplaĉe la teknikon. Poste tiuj libertemaj tekstoj estas uzataj ankaŭ por aliaj lingvoj. La plej junaj kreas ĝin en Esperanto kun traduko al la gepatra lingvo (ĉe ni la franca), la pli aĝaj gelernantoj kreas ĝin en la germana (lingvo lernita tuj post Esperanto) kun traduko al Esperanto kaj al aliaj lernataj aŭ dehejme sciataj lingvoj.

En novembro 2010 realiĝis unu el niaj revoj, nome fari tutan semajnon nur en Esperanto kun la pli junaj gelernantoj, dum la pli aĝaj praktikis nur la germanan lingvon. La sukceso estis tiom granda, ke ni refaris ĝin en la sama lernoĵaro en marto 2011 kaj ekde tiam ĉiujare ni okazigas du lingvo-semajnojn. En ambaŭ grupoj ni klopodas fari kiel eble plej diversajn aktivecojn ĉiam nur en la cello. Dum tiu lingvo-semajno ĉe la pli junaj ĉie videblas Esperanto: sur la pordoj, sur la muroj, sur la skribotabloj ktp. La laborplano estas en Esperanto por la individuaj laboroj kiel preparo de prelegoj aŭ eksperimentoj, kreado de libretoj, solvo de esperantigitaj enigmoj, Mazi-kajero ktp. En grupeta laboro kreiĝas skeĉoj, teatraĵoj



parkerigitaj kaj prezentataj samsemajne por la aliaj grupoj. Ili preparas kukojn el esperantigitaj receptoj, aĉtante la ingrediencojn Esperante (en mia porokaza magazeno), kaj ludas kiam ili havas iom da tempo. Krom la variaj aktivecoj motivas ilin ankaŭ tio, ke ĉiu tiusemajna laboro valoras poentojn „elspez-eblajn” en la semajnfina aŭkcio, kiu ĉiam estas tre populara. Ili lernas multon diversterene sen vere rimarki tion. Ĉion eblas demandi, sed nur en Esperanto. Ne gravas, ja ili eĉ spontane interagas Esperante, aŭdiĝas demandoj kaj respondoj sen iu ajn plenkreskula interveno. Festo konkludas la grandan laboron, kie ili povas manĝi la

bakitaĵojn spektante Mazi, kiu estas tre ŝatata kaj forte identigita kun Esperanto (alilingvaj versioj de ĝi estis simple kaj kategorie rifuzitaj de la gelernantoj, ĉar Mazi ne povas paroli en alia lingvo, nur en Esperanto!).

Grava elemento de nia pedagogio estas ankaŭ la lerneja konsilio. Ĉiuvendrede ni konkludas la semajnon per tiu organo, en kiu ĉeestas ĉiuj gelernantoj, minimume la du grup-respondecaj instruistoj kaj foje ankaŭ aliaj instruistoj, staĝantoj, gastoj. Dum tiu horo laŭvice prezidas la pli aĝaj gelernantoj kaj unu instruisto (ĉar skribas pli rapide ol lernanto) protokolas la kunsidon. Estas eblo gratuli iu(j)n pro io aŭ paroli pri travivitaj malagrablaĵoj koncerne ion aŭ iun serĉante solvon por repaciĝo. Poste ni relegas la protokolon de la antaŭa kunsido, kontrolante, ĉu la tieaj decidoj estis plenumitaj, respektitaj. Post notado de kelkaj regulaj, organizaj aferoj, estas loko por diversaj debatoj, proponoj, petoj venantaj de iu ajn partoprenanto, kiujn ni pridiskutas kaj pri kiuj ni decidas kune.

Dum la konsilioj same kiel dum la pritaksadoj de la gelernantoj (kiuj okazas - anstataŭ notoj! - unu foje jare kun la koncernata lernant(in)o, ties gepatroj kaj la instruistoj, dum 1,5-2 horoj) elmerĝiĝas iu plusa valoro en kunlaborado, solidareco, aŭtonomio kaj en civitanaj kompetentecoj, kiuj estas verŝajne malfacile mezureblaj alimaniere aŭ en aliaj sistemoj. Tiu ĉi pedagogio donas la bazon de demokratio per kunlaboro tiom filozofie kiom pedagogie por havi pli justan kaj pli egalrajtan socion. Se vi ŝatus havi pli da informoj pri nia lernejo, ni invitas vin viziti nian retpaĝaron ĉe *www.grande-ourse.ch*, kie vi trovos abundajn informojn en la franca kaj bazajn informojn (pro manko de laborforto) en Esperanto, en la germana kaj en la angla. Bonvenon!

Bibliografio por la tri partoj:

- Beck, Isabelle 1993: *Espéranto, une langue sans frontières*. En: Bibliothèque de Travail second degré– 257. Cannes: Publications de l'école moderne française. pp. 1-48.
- Berteloot et al. 1968: *Les correspondances scolaires*. En: Bibliothèque de l'École Moderne – 50-53.
- Chabrun, Catherine 2015: *Entrer en pédagogie Freinet*. Paris: Éditions Libertalia
- Ecole de La Grande Ourse 1983-2018: *En bref – Comment ça marche? – Actualité*. <http://www.grande-ourse.ch/>
- Freinet, Célestin 2017: *Une éducation du travail*. En: *Le Nouvel Educateur* - 234. Paris: Çava-Expressions. pp. 51-53.
- Gasselin, Juliette 2009: *Vers une Méthode naturelle de Langues vivantes*. En: *Le Nouvel Educateur* - 193. Paris: ExpressionsII. pp. 53-55.

- Go, Nicolas 2009: La Méthode naturelle de Freinet. En: Le Nouvel Educateur - 193. Paris: ExpressionsII. pp. 28-35.
- Gyarmati Orsolya 2015: Hagyd játszani a gyereket! <https://csaladhalo.hu/hatter/hagyd-jatszani-a-gyereket/>
- ICEM 1991: Le droit à la communication directe par l'espéranto. En: Le Nouvel Educateur – 32, Supplément 229. Cannes: Publications de l'école moderne française
- Konfuciusz 2017: Beszélgetések és mondások. Budapest: Helikon
- Lefeuvre, Thérèse 1991: Comment communiquer? La barrière des langues. En: Bibliothèque de Travail Junior – 355. Cannes: Publications de l'école moderne française. pp. 2-21.
- Lentaigne, Léo 1959: Notre reportage: L'espéranto. En: Bibliothèque de Travail – 437. Cannes: Aegitna. pp. IV, 1-24, V.
- Szabó Kata 2012: Alattvalók iskolája - interjú Vekerdy Tamás gyermekpszichológussal. En: Vasárnapi hírek, 2012. november 18.
- Vekerdy Tamás 2014: Iskolák?!?! - Gyerekek, szülők és tanárok. Budapest: Central Médiacsoport Zrt.
- Vilisics Ferenc 2016: Hagyd a gyereket játszani! – Öt évünk a finn óvodával. <http://hellomagyarok.hu/karrier/hagyd-a-gyereket-jatszani-ot-evunk-a-finn-ovodaval>

Pri la instruado al mil gestudentoj ĉe la Artkolegio de Kunming (Ĉinio)

de Alessandra MADELLA (Italio), aminafuji2@yahoo.it

De la mezo de septembro, la Artkolegio de Kunming – kiu troviĝas en la ĉefurbo de la naci-riĉa regiono Yunnan en sud-okcidenta Ĉinio – estas lanĉanta jar-longan kurson de Esperanto al mil gestudentoj inter dekkvin- kaj dekok-jaraĝaj. Tiu novaĵo, kiu certe venos kiel tre bonvena surprizo al la Esperanto-movado ekster Ĉinio, trovas siajn solidajn bazojn en la konstanta agado de la lernejo favore al nia lingvo dum la lastaj kvin jaroj. En tiu ĉi artikolo, mi do unue mallonge resumas la kondiĉojn, kiuj ebligis fondi tiun evoluigon sur stabila kultura fono, malfermata al la Esperanta pensmaniero. Poste, mi detalos la enhavon de la unuaj lecionoj de la nova kurso. Fakte, ili havas pedagogian valoron, kiel la unua kontribuo, kiun tiu ĉi unika sperto povas alporti al nia komprenemo de pli efikaj manieroj instrui al junaj ĉinaj gestudentoj, precipe en tiel granda nombro.

Kondiĉoj de la daŭra ĉeesto de Esperanto-instruado ĉe la Artkolegio de Kunming

La Artkolegio estas jam konata de la legantoj de IPR, ĉar ĝi organizis la ILEI-Konferencon de 2012. Fakte tiu evento estis grava turnopunkto en la rilatoj inter la Artkolegio kaj Esperanto. Ĝia prezidanto, S-ro DUAN Yongxing, jam montris siajn entreprenajn kapablojn organizante en Kunming la unuan Ĉinan kongreson de Esperanto antaŭ tridek jaroj. Sed, kvankam li daŭre amis kaj subtenis nian lingvon, la kresko de la lernejo okupis lian tutan energion dum la sekvaj jaroj kaj malpermesis realigi lian revon tiel grandskale instrui Esperanton. La ILEI-Konferenco, male, komprenigis ankaŭ al la komence skeptika estraro de la kolegio la potencialon de Esperanto por ĝia internaciigo kaj eĉ por la dungado de kvalifikitaj fremdaj instruistoj en art-rilataj fakoj. Ĝi ankaŭ fortigis la ligojn de la kolegio kun la Esperantaj instancoj de Pekino kaj Shanghai, ĉar venis por helpi pretigi la junajn volontulojn valorplenaj homoj kiel S-ino YU Jianchao (tiam redaktorino de Ĉina Radio Internacia kaj nuntempe prezidantino de la Pekina Esperanto-Asocio) kaj S-ro WANG Minghao, prezidanto de la Shanghai-a Esperanto-Asocio.

De tiu momento, la Artkolegio sin lanĉis en sinsekvon de Esperanto-agadoj, inkluzive de la organizado de la internacia konferenco de IFEF kaj de la datrevena Ĉina kongreso en 2015. Krome, la Artkolegio iĝis ankaŭ la oficiala sidejo de la Yunnan-a Esperanto-Asocio, kies estraro estis junigata fare de siaj profesoroj, kiel la nuna tibeta vicsekretariino SAYON Zhuoma. De la vidpunkto de Esperanto-instruado, tiuj eventoj permesis la daŭran preparadon de volontuloj kaj interesadon de novaj profesoroj, kaj do la konstantan ĉeeston de nia lingvo inter la junuloj de la kolegio. Tamen okazis dumvoja ŝanĝo en la baza konsisto de la studentoj de Esperanto. La Artkolegio estas fakte universitat-nivela, kutime edukante studentojn ekde ilia dekokaj jaraĝo. Tiaj estis do la unuaj volontuloj. Iuj el ili sufiĉe kontentige regis la anglan por faciligi la lernadon de esence eŭropa lingvo kiel Esperanto. Tamen multaj el ili venis el ne tiel riĉaj familioj kaj jam de la tria jaro de studado pri sia fako komencis private instrui. Ilia tempo estis do vere limigita.

S-ro Duan havis tiu-rilate genian penson: kuntreni kiel volontulojn por la lernado de Esperanto la studentojn de iu lernejo, kiu lastatempe kunligiĝis kun nia kaj kiu specialiĝas en la trejnado de estontaj gestedardoj por aviadiloj kaj grand-rapidaj trajnoj. Tiuj gestudentoj estas pli junaj – de dekkvin- ĝis dekok-jaraĝaj – kaj sin pretigas por nuntempe tre laŭmoda laboro, kiu portos

ilin en oftan kontakton kun eksterlandaj turistoj. Tamen ilia kono de la angla estas preskaŭ nula. Ili nur bone konas sian originan lingvon de la suda Yunnan-a landlimo kaj la mandarenan. En tiuj kondiĉoj, S-ro Duan vidis grandan eblon por Esperanto, ĉar la kono de plia fremda lingvo povas fakte doni al ili ne-disputeblan avantaĝon en dung-intervjuoj. Tiu simpla eltrovo permesis, ke niaj kutimaj kvardek volontuloj tuj fariĝu mil.

Teknikoj por la instruado al mil ĉinaj gestudentoj

Kompreneble, la instruado al mil junaj gestudentoj prezentas iom da problemoj. Por realigi la gvidan vidon de la prezidanto Duan, krom la intereso de la gestudentoj kaj la bonaj rilatoj kun la lokaj edukadaj instancoj, plej gravas la ĝentila kaj silenta agado de S-ro ZHANG Lianjin, la sekretario de la Yunnan-a Esperanto-Asocio. Li fakte kapablis organizi la strukturojn kaj la horarojn por la lecionoj kaj akurate alvenigi la tekstolibrojn, do mil ekzemplerojn de *Moderna Esperanto* de profesoro LI Weilun, kiu sin pruis dum la jaroj la plej proksima al la ĉina pens- kaj lern-maniĝo. S-ro Zhang precipe sukcesis en la malfacilega laboro rapide formi internacian teamon de instruistoj ankoraŭ sufiĉe junaj por efike instrui al tiel junaj gestudentoj. Krom mia helpo, limigita pro jam plenaj kursoj en alia departemento, specife flankas lin en tiu giganta pedagogia tasko la korea instruisto CHOI Manwon (Esperante: Dekmil) kaj la ĉinaj geinstruistoj LIU Baoguo (Esperante: Optimisto) kaj LI Lin (Esperante: Jadobela).

Post ĝenerala enkonduko antaŭ ĉiuj mil gestudentoj pri la historio kaj celoj de Esperanto fare de S-ro Duan la dekokan de septembro, lundon la dudekkvinan komenciĝis la unuaj praktikaj lecionoj fare de S-roj Choi kaj Liu. En la sekvanta parto de la artikolo, mi do detalos iliajn instru-stilojn fronte de klasoj de pli ol sesdek kvin lernantoj dum leciono de unu horo kaj duono. La impresoj kaj konsiloj, kiujn ni povas eltiri el iliaj malsamaj teknikoj, espereble utilos por similaj estontaj kursoj. S-ro Choi, kiu doktoriĝis pri politika scienco en la Popola Universitato de Pekino kaj laboris ĉe *El Popola Ĉinio*, elektis mirigi la gestudentojn per sia perfekta kono de la mandarena kaj profundigi ilian komprenon de la internacieco de Esperanto per komparo kun la cirkulado de sam-skribaj sed malsam-prononcaj ideogramoj en Orienta Azio. Post fokusado sur iujn el la plej konfuzpovaj konsonantoj en la Esperanta alfabeto – kiel la malsameco inter /d/ kaj /t/, /g/ kaj /k/ aŭ /f/ kaj /p/ – li tuj turniĝis al la salutoj kaj al la plej facilaj demandoj por sentigi al la gestudentoj la vivecon de la lingvo.

Eble eĉ pli interesa estis la instrua metodo de S-ro Liu, kiu venas de longa sperto kiel Esperanta pedagogo en malsamaj lokoj de Ĉinio kaj eĉ de Pollando. Li mirinde sukcesis teni la konstantan atenton de la gestudentoj nur per korusa kaj eĉ kanta ripetado de la alfabeto kaj de ĝiaj silabaj kombinaĵoj. Pere de energia aplikado de la Cseh-metodo, li sukcesis tiel kanalogi la jam establitan kutimon de ĉinaj gestudentoj korusse ripetadi por kune enirigi ilin en la mondon de alia lingvo. Kompreneble ankaŭ en mia instruado de Esperanto en Ĉinio mi spertis la gravecon de korusa ripetado, kontraste kun la pli granda fokuso pri individua kompreno aŭ grupeta praktikado en mia lingva instruado en Italio, Japanio kaj Usono. Sed tiu ĉi estas la unua fojo, kiam mi vidis tutan lecionon konstruitan sur tiu ĉi principo brile sukcesi.



Instruisto LIU kun studentinoj

La geknaboj precipe multe amuziĝis pri la kombinado de literoj en silaboj kaj ĝia ĉiam pli rapida ripetado. Signife, kiu instruis en Ĉinio, scias ke tio estas gravega problemo. Fakte, geknaboj, kiuj ne konas alian okcidentan lingvon, ne kapablas dividi longajn vortojn en silabojn. Multfoje ili nur klopodas diveni la sekvon de la vorto de la unua silabo, trafante aŭ maltrafante ĝin, ĉar longaj serioj da silaboj konfuzas ilin, kontraŭ la plej koncentrita senco-povo de la ideogramoj. Do komenci al kutimigi ilin al malsamaj silaboj de la tuta unua leciono, trans la kutima ripetado de literoj

plus „o”, ŝajnas al mi tre bona kaj potence fruktodona metodo. Aliaj gravaj kaj amuzaj klarigoj estis pri la fonemo /r/, kiu estas kutime uzata de multe da nacimalplimultoj en Ĉinio, kiel la tibetanoj. S-ro Liu kunligis ĝin al la sono de motorciklo, tiel donante vojon al ridetanta imitado.

Eĉ pli grava estis klarigo pri la malsameco inter la fonemoj /l/ kaj /n/, el kiuj la dua estas ankaŭ vide pli naza. Laŭ mia sperto, fakte, ankaŭ se ĉinaj lernantoj povas havi problemojn eldiri la fonemon /r/, ne malfacilas por ili distingi ĝin aŭde de /l/. Samas pri /d/ kaj /t/ aŭ /g/ kaj /k/. Sed, se ĉinoj el iuj regionoj ne kapablas distingi inter /l/ kaj /n/, tio estas kaj voĉe kaj aŭde. Komprenoble en Esperanto tio kreas ne malmultan embarason, precipe pri ofte uzataj finaĵoj kiel „ino” kaj „ilo”. Ĉar S-ro Liu venas el unu el tiaj regionoj, li kapablis eltrovi tre efikan metodon tuj solvi la problemon. Mi esperas, ke pere de tiu ĉi lasta ekzemplo kaj de la antaŭaj mi sukcesis montri, ke instrui al mil homoj estas certe tre malfacila kaj kompleksa entrepreno. Tamen ĝi estas ankaŭ okazo lerni teknikojn por instrui al pli grandaj klasoj kaj tiel almenaŭ parte solvi tiun, kiu estas laŭ mi unu el la plej gravaj problemoj de la nuntempa Esperanto-movado. Alivorte, la preskaŭ tuta manko de kapablaj mez-aĝaj instruistoj fronte de la ĉiam pligrandiĝanta tutmonda peto de Esperanto-instruado.

3 gravaj eventoj en rilato kun UNESKO

Laŭ temposkemo:

En novembro 2017 okazis Ĝenerala Konferenco de UNESKO en la ĉefa sidejo en Parizo. Tiu evento okazas ĉiun duan jaron. Nome de ILEI laboris tie kvin observantoj.

La dekan de decembro okazis Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) de UEA en la sidejo de *Espéranto-France* en Parizo. La temo estis eksteraj rilatoj. Partoprenis trideko da personoj. Prelegis inter aliaj personoj Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI, pro la fakto, ke ŝi laboris nome de UEA en Ĝenevo en la ĉefa sidejo eŭropa de Unuiĝintaj Nacioj dum kelkaj jaroj. Ŝi raportis pri siaj spertoj kaj analizis la efikajn strategiojn en tiaj medioj.

La deknuan de decembro okazis solenaĵo por konkludi la Zamenhof-Jaron en salono ĉe UNESKO. Partoprenis proks. 130 personoj. La evento estis organizita de la pola delegacio ĉe UNESKO.

Bonvolu trovi ĉi-sube du raportojn pri la laboro de niaj observantoj dum la Ĝenerala Konferenco kaj raporton pri grava pinta kunveno, kiu okazis improvize fine de AMO-seminario.

Edukado: Teni niajn engaĝiĝojn

Dum la 39-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Parizo, la 1-an de novembro je la 8-a matene, kunvenis ministroj pri edukado el Bangladeŝo, Ĉilio, Liberio, Norvegio kaj Tunizio por kundiskuti la raporton fare de la Monda Banko pri la stato de edukado en la mondo. La tuta raporto GEM (Global Education Monitoring) bone statistikas ĝin. Kunsidestris Manos Antoninis, direktoro de tiu raporto. 100 milionoj da infanoj en la mondo ne scipovas legi (sed ne tuŝitas la instrulingvo, ofte malsimila al la gepatra lingvo de la infano); 80% el la landoj ne proponas liberan aliron al senpaga instruado, tamen 55% enskribis la rajton je edukado en sian konstitucion kaj eblus procesi kontraŭ la ŝtato. Nur unu lando el du prezentas jaran raporton, unu lando el 4 ne disponigas 4% de sia budĝeto al instruado. Leviĝis la demando pri privatigo de instruado tra privata mono (tion faras Liberio) kaj sekve instruado iĝas banala varo, kvankam la Ministro argumentis, ke la ŝtato mem nomumas la instruistojn, kiuj devas sekvi la ŝtatajn programojn. En kelkaj landoj, la instruistoj, ne pagataj aŭ malmulte pagataj, instruas nur la duonon de la programo por kapti „privatajn lernantojn”, se la gepatroj povas krompagi apartajn lecionojn. En nur 22% de la lernejoj sude de Sahelo estas elektro (do kio pri la novaj teknologioj? ...), en multaj ne estas necesejoj, tiel la knabinoj ne vizitas lernejojn por ne esti perfortitaj dum ili pisas en plena naturo. Fronte al tiuj situacioj, la Monda Raporto konkludas, ke la „ŝtatoj devas”, „la ŝtatoj faru”... Forte reagis en ne kutima tono en tiu loko la ministro pri edukado el Tunizio, kiu koleris kontraŭ „la ŝtatoj devas”: Sed ĉu vi faris al vi la demandon „Ĉu ili povas? Eliru pli ofte el via oficejo kaj iru surloken”. Ofte mankas kapablaj instruistoj, inspektoroj por kontroli la universitatojn, sciencistoj, kaj ebla solvo estus altigi la salajrojn de instruistoj por altiri kompetentajn homojn.

Renée TRIOLLE

Raporto de ILEI-delegitoj pri la Ĝenerala Konf. de UNESKO 2017

Ĝi okazis de la 30-a de oktobro ĝis la 14-a de novembro en la ĉefa sidejo de UNESKO en Parizo. Ekde la unua tago „svarmis diligentaj abeloj”, kiuj provis malkovri ne nur la homojn kaj la lokojn sed ankaŭ novan taskon. Por la unua fojo ILEI havis 5 delegitojn same kiel UEA, do ni estis tre videblaj des pli ke estis nur unu NRO - pri dislekcio - kiu varbis samtempe. Rapide niaj delegitoj konsciis en kiu maniero, kun kiuj homoj ili pretas rilati. Tiel

kelkaj varbis en salono, kie sidas la delegacioj, aliaj en salono, kie kunvenas NROj kaj certe, ĉiuj el ni en koridoroj, vicoj, restoracioj kaj ĉe kokteloj.



De maldekstre: Pascale Voldoire, Emmanuel Desbrières (ILEI), Didier Loison, Barbara Despiny, François Lo Jacomo, Renée Triolle (UEA), Rakoena Maertens (UEA TEJO), Jean-Pierre Boulet, Marie-Sylvie Julian, Monique Arnaud (ILEI)

Malfacile diri, kiom da homoj ni kontaktis, sed gravas diri, ke tiuj homoj ofte havis kontaktojn kun pluraj el ni. Bedaŭrinde kelkaj delegacioj ĉiam alvenis lastminute kaj estis malfacile renkonti ilin. Ĉi tiun jaron pli ol 200 ŝtat-representantoj kaj NRO-delegitoj petis parolvicon kaj inter la lastaj UEA. Rakoena Maertens brile alparolis la publikon okaze de plenkunsido.

Same kiel en 2015 la ĉefaj temoj rilatis al la celoj 2015-2030: daŭripova evoluo, klimataj ŝanĝiĝoj kaj iliaj konsekvencoj, altkvalita edukado por ĉiuj kun bone trejnitaj instruistoj, protektado kaj promociado de kultura diverseco kaj de monda heredaĵo, rajtoj sin esprimi, protektado de ĵurnalistoj.

Same kiel en 2015, kiam eblis, ni provis prezenti al homoj dokumenton en ilia gepatra lingvo. Niaj dokumentoj estis tradukitaj al 16 lingvoj.

Okaze de publikaj paroladoj la angla lingvo estis uzita proksimume cent foje, la franca 55 foje; la reprezentantoj de kelkaj delegacioj uzis ambaŭ lingvojn. Daŭre pri lingvoj, ni aŭdis 23 fojojn la araban, 15 fojojn la hispanan, 6 fojojn la rusan kaj 2 fojojn la ĉinan. La reprezentantoj surpodie foje uzis sian gepatran lingvon, tiel ni aŭdis 4 foje la portugalan, po 1 kelkajn aliajn lingvojn kaj poemon en la maoria lingvo!

La mandato de Irina Bokova, ĝenerala direktorino de UNESKO, finiĝis kaj ni havis la honoron saluti kaj danki ŝin. Mi sukcesis enmanigi al ŝi la bulgaran version de nia ILEI-dokumento. Vizitu la TTTejon <https://fr.unesco.org/generalconference/39>. Krom la ILEI-varbilon ni disdonis specialan

dokumenton pri Zamenhof kaj Esperanto, kies lasta parto estas: „Invitilo al la Ceremonio de la 11a de decembro 2017, Centjariĝo de la forpaso de Zamenhof, Iniciatinto de Esperanto.” La 5 ILEI-reprezentantoj estis Jean-Pierre Boulet, Emmanuel Desbrières, Marie-Sylvie Julian, Pascale Voldoire kaj Monique Arnaud. Tre agema teamo, bonega etoso inter ni; tamen ni nepre bezonas anstataŭantojn.

Raportis: Monique ARNAUD

Nomumado de la nova Ĝenerala Direktorino de UNESKO

Okaze de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en novembro 2017 okazis voĉdona konfirmo de la elekto de posteulo de Irina Bokova en la posteno de Ĝenerala Direktoro de UNESKO. Elektiĝis Sinjorino Audrey Azoulay el Francio. Mi sidis en restoracio en Kotonuo, Benino, kaj povis spekti ŝian unuan renkontiĝon kun ĵurnalistoj en Parizo en la ĉefa sidejo de UNESKO. Reveninte al Svislando mi skribis al Sinjorino Azoulay por gratuli ŝin nome de ILEI kaj rememorigi al ŝi la kandidatiĝon de ILEI por esti NRO agnoskita de tiu tutmonda UN-strukturo, kiu okupiĝas pri edukado, scienco kaj kulturo.

Mireille GROSJEAN

Paŝoj al plena agnosko

LA VOJO

Rezolucio 1954 Montevideo: farita paŝo

1977: Ĝenerala direktoro, Amadou MATHAR M'Bow en la UK en Rejkjaviko: farita paŝo

Rezolucio 1985 Sofio: farita paŝo

2017 EO-versio de la UNESKO-Kuriero: komenco farita; subtenenda firmigenda paŝo, longdaŭra agado

Registrigo de ILEI kiel NeRegistrara Organizo (NRO) ĉe UNESKO: paŝo farita en januaro 2016 de ILEI; en atendo de respondo.

Gratulado de la nova Ĝenerala Direktorino A. Azoulay fare de la prezidantino de ILEI M. Grosjean nov. 2017. Farita paŝo.

Registrigo de TEJO kiel oficiala partnera NRO ĉe UNESKO: paŝo en preparo.

Elekto de UEA (Rakoen MAERTENS?) en la Liga Komitato de la NROj ĉe UNESKO: paŝo en preparo.

Registrigo de EO en la UNESKO-listo de mondaj nemateriaj heredaĵoj: paŝo farebla, farenda.

Ĉirkaŭ ronda tablo ĉe *Espéranto-France* en Parizo la 10-an de decembro 2017 sidis ok aktivuloj. Ili skizis la agadon de nia movado en rilato kun UNESKO dum la venontaj kvin (?) jaroj.

Lernante el la historio, ni nepre devas tuj komenci agi.

Estas fakto, ke preparlaboroj jam komenciĝis en 1952: publika debato en Parizo, partopreno de UNESKO-kunlaboranto en la UK en Zagrebo, HR, stimulado-laborigado de ĉiuj Landaj Asocioj, kongresa rezolucio pri UNESKO en julio 1954 en Harlemono, NL.

8-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO, novembro - decembro **1954 en Montevideo, UY**, kun aprobo de **pozitiva rezolucio pri EO**. Ekspozicio pri EO apud la Parlamenta Palaco. Surloke brile kaj efike agadis Ivo LAPENNA. Sukcese.

Estas fakto, ke la preparo de la **rezolucio de 1985** komenciĝis du jarojn pli frue fare de la tiel nomata Pariza Grupo (Chicot, Despiney, Guérout), sub la gvido de Humphrey TONKIN. Kelkaj naciaj komisionoj (interalie Ĉinio, Germanio, Hungario, Pollando) estis kontaktitaj kun la celo prezenti rezolucion favoran al EO dum la Ĝenerala Konferenco en Sofio, BG. Surloke brile kaj efike agadis Tibor SEKELJ. Sukcese.

Alia grava evento en **1985 estis la Monda Kongreso de Junularo en Barcelono**, sub la aŭspicio de UNESKO, kie la NROjn UEA/TEJO reprezentis Barbara DESPINEY kaj Elizabeth SCHWARZER. Ili havis mem propran standon pri TEJO kaj Esperanto; tiu evento klare montris la bonegan pozicion de nia junulara agado ĉe UNESKO.

Estas fakto, ke en 2017 brile kaj efike agadis HUANG Yinbao „Trezoro”. Sukcese. Li obtenis la rajtojn de UNESKO por **publikigi en EO la UNESKO-Kurieron**. Li obtenis ISSN por la eldono. La eldonado de la UNESKO-Kuriero estas daŭra agado, kiu bezonas laborfortojn kaj financojn. Tion ni nun devas plani kaj organizi. Se tio ne okazas, la Kuriero ĉesos aperi kaj tio pruvos nian lamecon. Do tradukistoj bezonatas. Kreado de fonduso por finance subteni la eldonadon bezonatas, estas jam survoje. Kontakto UEA-n, se vi volas fari paŝon en tiun direkton.

UNESKO permesas, ke la oficiala retpaĝo de la UNESKO-Kuriero estu ankaŭ en Esperanto. Farenda paŝo.

Farendaj paŝoj

ILEI en atendo de decido.

TEJO kandidatigaĵas por esti oficiala partnera NRO.

Ĉe UNESKO ekzistas **Liga Komitato**, kiu konsistas el reprezentantoj de naŭ NROj. Estas grava ero en la UNESKO-strukturo. UEA estas kandidato por la elektoj okazontaj en 2018, Rakoen MAERTENS estas en bona pozicio por reprezenti nian Asocion UEA kaj atingi tiun postenon. Se niaj delegitoj aktivus en diversaj laborgrupoj de la Liga Komitato, tio altigas niajn ŝancojn eniri tiun gravan instancon.

Ĉar UNESKO ĉefe aŭskultas la **afrikajn delegaciojn**, ni nepre devas klopodi obteni kunlaboron de diversaj afrikaj Ŝtatoj. Viziti ministrojn en Afriko, flegi kontaktojn kun la delegacioj en Parizo. Se tri aŭ kvar afrikaj Ŝtatoj prezentos Esperanton ĉe UNESKO bone kiel taŭgan solvon por la lingva problemo en Afriko kaj en la tuta mondo, tio skuos UNESKO-n pozitive.

Se ni ĉiuj laboras efike kaj adekvate dum du-tri jaroj, se la Landaj Asocioj agadas en sia teritorio, ni certe sukcesos, ke **Esperanto aperu en la listo de Nemateriaj Heredaĵoj de UNESKO**.

En la diskuto partoprenis:

- Renée TRIOLLE, aktivulino ĉe UNESKO de jardekoj
- Barbara DESPINEY, aktivulino ĉe UNESKO de jardekoj
- François LO JACOMO, aktivulo ĉe UNESKO de jardekoj
- Mireille GROSJEAN, aktivulino ĉe UN en Ĝenevo dum pluraj monatoj, prezidanto de ILEI
- Rakoen MAERTENS, aktivulo ĉe TEJO de jaroj
- Olga ŜEVĈENKO, aktivulino ĉe TEJO
- HUANG Yinbao „Trezoro”, aktivulo ĉe UNESKO de monatoj
- Stefan MACGILL, vic-prezidanto de UEA

Gvidis la improvizitan pintan laborkunsidon brile kaj efike: Rakoen MAERTENS. „Kiu faras tion? Ĝis kiam?...” Bravo!

(Noto: *simila artikolo aperis en la revuo Esperanto*)

Mireille GROSJEAN

EDUKADO AL PACO laŭ Lech WAŁĘSA

– kunlaboro kaj reciproka respekto –

Intervjuo okazinta la unuan de novembro 2017 ĉe UNESKO, Parizo, kadre de la Ĝenerala Konferenco.

Kadre de la Forumo de ŝtatestroj, dum kiu ĉiuj ŝtatoj prezentas sian agadon dum la pasintaj du jaroj, nova prezento estis la intervjuo de Lech WAŁĘSA

(en la pola) fare de reprezentantino de la Nobela Pac-Centro en Norvegujo
(en la angla).

Lech WAŁĘSA, simpla elektristo en la ŝipkonstruejo en Gdańsk (Pollando), estris la sindikaton *Solidarność* (Solidareco), kiu faligis la tutan politikan sistemon. Li iĝis Prezidento de Pollando (1990-1995) kaj ricevis la Nobelpremion pri Paco en 1993. Ĉar la transigo estis tute paca, indas koni alian vidpunkton.

Novaj fundamentoj de nia civilizo estas libereco, libervola interŝanĝo, juro, kompare kun la antaŭa (antaŭ la disfalo de Sovetunio). Malriĉeco kreskas, demokratio estas endanĝerigita. Kiel mezuri demokratecon? Ĉu 30% estas konstitucio kaj leĝoj? 30% socia sinteno, 30% socia riĉeco? Statistike, ĉiuj el ni povus esti prezidento dum 7 minutoj en sia vivo!

Ĉu apliki al la mondo la solvojn, kiuj sukcesigis *Solidarność*? Tio estas solidareco, respekto kaj toleremo. Prefere dinamiki la diskutojn kaj plibonigi la mondon, prikonsiderante la diferencojn; instrui al homoj kundiskuti, voki ilin konstrui ankoraŭ pli bonan mondon, permesi al neniu nin detruji.

La celoj 2030 de la kalendaro de Unuiĝintaj Nacioj inkludas ĉiujn, sed estas multaj diferencoj: do unue aŭskulti la popolojn (10% de la loĝantaro posedas 90% de la monda riĉeco), redoni laboron al ĉiuj, kiuj scias kiel labori, redukti senlaborecon, uzi sian riĉecon por krei laborpostenojn kaj riĉiĝi.

Kiel sukcesis *Solidarność*? En 1980 estis du blokoj, kun unu miliono da rusaj soldatoj trans la landolimo, neniu pensis, ke eblos ŝanĝi la sistemon. Elektiĝis pola papo (Johano-Paŭlo la dua), la mondo interesiĝis pri Pollando, religio kaj kunpreĝado helpis pensi, ke „eblas”. „Ni ne timu”, organiziĝis luktogrupoj por tiri 10 milionojn da homoj por lukti kontraŭ komunismo. Intelekta kaj spirita aliro plifortis ol materialista. La mondo estas mirinda, eblas supervenki ĉiujn murojn en reciproka respekto.

Kion fari fronte al malfermitaj landolimoj kaj migrado? Ne ekzistas mirakla rimedo. Necesas kunlabori kaj necesas institucioj kiel UNESKO; se ne, ekestos ĥaoso. Havi komunajn programojn kaj dividi la gvidadon donos pli grandan efikon por persvadi la aliajn. Organizigi, kunlabori efike por konstrui brilan estontecon.

Renée TRIOLLE,
delegito de UEA ĉe UNESKO

Aligilo

LA 77-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO
LA 51-a KONGRESO DE ILEI
Madrid, Hispanio, 20 - 28 julio 2018

* La asterisko indikas nepre respondendajn demandojn.

Aliĝo al*: nur Hispana kongreso nur ILEI-kongreso ambaŭ

S-ino/ S-ro Persona(j) nomo(j)* _____

Familia(j) nomo(j) * _____

Naskiĝdato _____ Lando* _____ Urbo _____

Loĝadreso _____

Retpoŝtadreso* _____ Kontakt-telefono _____

Ĉu vi bezonas vizon por eniri la kongreslandon?* JES / NE

Ĉu vi konsentas aperigon de via retadreso en partoprenlisto?* JES/ NE

Aliĝkategorio*: Membro de HEF MEL ILEI

Honora Membro de ILEI Ne-membro Infano Junulo

Handikapulo Por 1 aŭ 2 tagoj Familiano de alia aliĝinto

Alvendato: _____ Forirdato: _____

Kotizo (EUR)*: _____ Donaco (EUR): _____ Entute (EUR)*: _____

Celo de la donaco: _____

Pagmaniero*:

(1) Tra ING-banko, (2) Tra UEA, (3) Al HEF, (4) Al MEL, (5) Per Paypal

Kiun lingvon vi pretas prezenti en la Lingva Festivalo? _____

Aliaj kontribuproponoj? _____

En kiuj kursoj, seminarioj, trejnado vi ŝatus partopreni? _____

Komentoj _____

Kotizkondiĉoj: Mi komprenas kaj akceptas, ke:

- Pagendas la kotizo valida por la dato de pago laŭ la koncerna kotiztabelo.
- Kaze de rezigno, 50% de la kotizo estos repagitaj se aliĝinto malanoncas sin pro valida kaŭzo antaŭ la 15-a de junio de la kongresa jaro.

Loko, dato _____ Subskribo _____

La plenigitan aliĝilon bonvolu sendi al: Hispana Esperanto-Federacio, Rodríguez San Pedro 13, 3^o-7, ES-28015 Madrid (Hispanio) aŭ ĝian skankopion al retadreso: kongreso2018@esperanto.es. Se vi povas, prefere uzu la retaliĝilon:

<https://goo.gl/forms/PhZIGEynNUn54ngm2>

Kotizoj de Hispana Kongreso de Esperanto, Madrido, 20-22 julio 2018

Aliĝperiodo*	ĝis 31.03.2018	ĝis 30.06.2018	post 30.06.2018
Aliĝkategorio**			
Membro de HEF aŭ MEL	30	35	45
Ne-membro	40	45	55
Juna membro de HEF/MEL ⁽³⁾	15	20	25
Juna ne-membro de HEF/MEL ⁽³⁾	20	25	30
Aliĝanto malpli-ol-18-jara ⁽²⁾	5	5	5

Kotiztabelo de ILEI-kongreso, Madrido, 21-28 julio 2018

Aliĝperiodo*	ĝis 31.03.2018		ĝis 30.06.2018		post 30.06.2018	
Aliĝkategorio**	A	B	A	B	A	B
Membro de ILEI ⁽¹⁾	60	35	70	40	85	50
Ne-membro	75	50	90	55	105	65
Infano ĝis-18-j. ⁽²⁾	5	5	5	5	5	5
Junulo ⁽³⁾ , handik. ⁽⁴⁾	30	20	35	25	40	30
Familiano ⁽⁵⁾	50%	50%	50%	50%	50%	50%
Nur-simpozia ⁽⁶⁾	30	30	35	35	40	40

Komuna kotiztabelo por ambaŭ kongresoj, 20-28 julio 2018

Aliĝperiodo*	ĝis 31.03.2018		ĝis 30.06.2018		post 30.06.2018	
Aliĝkategorio**	A	B	A	B	A	B
Membro de ILEI ⁽¹⁾	68	40	80	46	97	59
Ne-membro	86	59	103	63	120	74
Infano ĝis-18-j. ⁽²⁾	5	5	5	5	5	5
Junulo ⁽³⁾ , handik. ⁽⁴⁾	35	25	40	30	45	35
Familiano ⁽⁵⁾	50%	50%	50%	50%	50%	50%
Nur-simpozia ⁽⁶⁾	30	30	35	35	40	40

La kotizoj en ĉiuj tri tabeloj estas esprimitaj en eŭroj (€).

Kotiz-kondiĉoj

* Validas kotizo laŭ la dato de pago.

50% de la kotizo estos repagitaj se aliĝinto malanoncas sin pro valida kaŭzo antaŭ la 15-a de junio de la kongresa jaro.

** Kotizkategorioj:

A. Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.

B. Ekssocialismaj landoj de orienta Eŭropo; landoj de Latinameriko, Afriko, kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko).

- (1) Membro de ILEI (resp. HEF aŭ MEL) estas tiu, kiu jam pagis membrokotizon por la jaro 2018. Honoraj Membroj de ILEI ĝuas 100%-an rabaton.
- (2) Infanoj kun akompananto kaj junuloj aĝaj ĝis 18 j. je 31 dec. 2017 pagas la infanan konferencan kotizon.
- (3) Junulo: kiu naskiĝis post la 31-a de decembro 1987.
- (4) Handikapulo. Bonvolu sendi al ILEI atestilon.
- (5) Familiano: Se aliĝas du aŭ pliaj samfamilianoj, unu plenkreskulo el ili pagu plenan kotizon kaj la cetera(j) pagu 50% de la respektiva kotizo laŭ la kotiztabelo. Familianoj estas konsiderataj: edz(in)o, ge(bo)filoj, ge(bo)patroj, geavoj, genepoj, koramik(in)o.
- (6) Unu- aŭ 2-taga kotizo: Por nur-simpozia, aŭ ajna partopreno dum nur unu aŭ du tagoj, validas aparta, malpli alta kotizo. Por partopreno longa pli ol 2 tagojn validas la plena kotizo laŭ la kotiztabelo.

Pagmanieroj

- (1) Tra ING-banko: Al ILEI-konto ĉe ING-banko, IBAN: NL55INGB 0004676855, BIC: INGBNL2A, kun indiko: "ILEI-Kongreso 2018" plus nomo. Aldonu 5 € se vi pagas de ekster Eŭropa Unio.
- (2) Tra UEA: Al ILEI-konto ilek-a ĉe UEA, indikante "ILEI-Kongreso 2018".
- (3) Al HEF: Al konto de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) ĉe banko BBVA: ES85 0182 1252 3102 0401 1961, kun indiko: "ILEI-Kongreso 2018" plus nomo.
- (4) Al MEL: Al konto de Madrida Esperanto-Liceo (MEL) ĉe banko ARQUIA: ES66 3183 2800 1700 0132 8957, kun indiko: "ILEI-Kongreso 2018" plus nomo.
- (5) Per Paypal: Paypal-konto de HEF: admin@esperanto.es (krompago de 2 €)

Privateco

Viaj nomo kaj devenloko aperos en reta listo de aliĝintoj kaj en la kongreslibro. Vi rajtas sugesti la manieron, sub kiu ĝi aperu.

Oni planas havigi liston de nomoj kaj retadresoj al ĉiuj kongresanoj, sed vi rajtas peti, ke vi ne aperu en tiu listo. Ceteraj informoj estos arkivataj ĉe HEF kaj ILEI kaj utiligataj nur por internaj celoj.

Laŭkutime oni multe fotas kaj filmas dum la kongreso kaj poste perrete diskonigas. Se vi ne deziras esti fotata aŭ filmata, bonvolu indiki tion.

Gastigado kaj transporto

La Kongresoj okazos en studenta rezidejo en la universitata areo, kie ankaŭ eblas loĝi je konvena prezo. La kostojn ni publikigos en aparta bulteno. Krome, Madrido disponas pri ĉiaj gastigeblaj, de la plej luksaj ĝis la plej moderprezaj. La organizantoj povos helpi vin trovi lokon, precipe se vi bezonas lingvan helpon.

Madrido estas facile atingebla. Ĝi disponas modernan flughavenon Madrid-Barajas, al kiu flugas kompanioj el la tuta mondo. El la flughaveno komfortaj metroo kaj trajno veturigas vin rekte al la urbocentro. Ĝi estas atingebla ankaŭ per trajno kaj aŭtobusoj, aŭ peraŭte. Oni antaŭvidas facilan kaj senpagan parkadon en la universitata areo, kie disvolviĝos la kongresoj.

Ene de la urbo, la publika transportsistemo estas fidinda kaj komforta.

Post la ILEI-kongreso, ni antaŭvidas organizitan komunan transporton per aŭtobuso al Lisbono, por UK.

KONTAKTO

- Eblas kontakti la organizantojn ĉe la adreso *kongreso2018@esperanto.es* aŭ: Hispana Esperanto-Federacio. *Rodríguez San Pedro 13, 3^o-7; ES-28015 Madrid (Hispanio)*. Telefonoj: +34-914 468 079; +34-638 547 104
- Pri faka, kleriga kaj organiza programo de la ILEI-Kongreso: Radojica Petrović <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>;
Poŝta adreso: *Bul. Oslobodjenja 36, RS-3200 Ĉaĉak, Serbio*
- Retejo de la kongreso: <http://www.esperanto.es/kongreso>.
- Kongresaj retpaĝoj de ILEI: <http://www.ilei.info/agado/konferencoj.php>
- FB-grupo ILEI-Kongresoj:
<https://www.facebook.com/groups/ILEI.Kongresoj/>

PROGRAMPROPONOJ

Se vi deziras prelegi en la Kongreso, aŭ alimaniere kontribui al ĝia programo, bonvolu indiki tion en la aliĝilo kaj aparte sendi al la ĉi-supre indikitaj adresoj (KONTAKTO) prezentojn de via kontribuproponoj verkitajn laŭ la jenaj ŝablonoj. **Limdato:** la 31-a de majo 2018.

Ŝablono de prelegpropono

Via preleĝtitolo

Via plena nomo, Via institucio (ILEI, AIS, Universitato de ... , aŭ simile)

Resumo: Ĉi tiu ŝablono difinas strukturon kaj enhavon de ILEI-simpoziaj kaj aliaj ILEI-kongresaj prelegproponoj. Por resumi vian prelegon bonvolu uzi 100 - 200 vortojn.

Ŝlosilvortoj: 3 - 5 ŝlosilvortoj, ekzemple: ŝablono, prezento de prelegpropono, resume, prezentiĝo de la aŭtoro

Aŭtoro / preleganto: Por prezenti vin kiel aŭtoron / preleganton bonvolu uzi maksimume 150 vortojn. Via preskvalita foto estu aldonita en aparta dosiero.

Ŝablono de aliaj kontribuproponoj

Titolo de via programero

Via plena nomo, Via institucio (ILEI, AIS, Universitato de ... , aŭ simile)

Tipo: Per maksimume 10 vortoj priskribu la tipon de la programero, kiun vi proponas, ekzemple: ateliero, diskutrondo, kurso, sceneja programero, prezento de literatura verko, kvizo, aŭkcio, sporta programero k.s.

Priskribo: Ĉi tiu ŝablono difinas strukturon kaj enhavon de ILEI-kongresaj programproponoj. Por priskribi la proponatan programeron bonvolu uzi 100 - 200 vortojn.

Celgrupo: Kiun vi deziras en la publiko aŭ partoprenantaro de via programero? Ekzemple: ĝenerala kongresa publiko, komencantoj, progresantoj, instruemuloj, infanoj, junuloj 15-30-jaraĝaj, ŝatantoj de beletro, sportemuloj k.s.

Proponanto: Por prezenti vin kiel proponanton / gvidonton bonvolu uzi maksimume 150 vortojn. Via preskvalita foto estu aldonita en aparta dosiero.

Konkursoj

INTERNACIA KONKURSO DE POEZIO POR JUNULOJ

POÉSIE EN LIBERTÉ – POEZIO TUT'LIBERA

Ĉi tiu konkurso, publikigita en la Oficiala Bulteno de la franca Ministerio pri Edukado, estas organizata de la Asocio „*Poesie en liberté*” (poezio tut'libera) ekde 1998. Ĝis nun, la poemoj estis nur franclingve. En 2017, partoprenis

4000 junuloj el pli ol 20 landoj. En 2018, por la 20-a eldono, dank' al la ago de *Espéranto-France*, **eblos ankaŭ verki poemojn Esperante.**

Kiu povas partopreni? Ĉiuj junuloj aĝaj de 15 ĝis 25 jarojn, el ĉiuj landoj. La partopreno konsistas en sendo de neeldonita poemo, versa aŭ proza, kun maksimume 30 versoj aŭ 30 linioj. La kandidatoj rajtas sendi po unu poemon en la franca aŭ en la Esperanta, sed eblas sendi po unu en ĉiuj el tiuj lingvoj. La partopreno okazas **nur rete ekde la 1-a de januaro ĝis la 7-a de aprilo 2018** uzante la formularon publikigitan ĉe www.poesie-en-liberte.fr
La ĵurio elektos la gajnantojn fine de majo 2018.



La ĵurio kun la gajnantoj (16.11.2017) en la Pariza urbo-domo

En novembro 2018, **tiuj estos invititaj dum 3 tagoj viziti Parizon.** La esperantistoj loĝos ĉe Esperantaj familioj kaj partoprenos grandan finan ceremonion. Samtempe, la poemoj estos eldonitaj en libro. Do ne hezitu sendi vian poemon. Eĉ se vi ne gajnas premion, via partopreno estas grava. Ni respondos al ĉiuj. Kontaktoj aŭ demandoj: gilles.tabard@gmail.com, www.poesie-en-liberte.fr. *Association Poésie en liberté, Maison des Associations, 38, boulevard Henri IV, FR-75004 Paris, Francio*

*Gilles TABARD,
Komitatano de Espéranto-France kaj vic-prezidanto de Poésie en liberté*

UNUA MUZIKA KONKURSO „ORA INSULO”

Kipra Esperanto-Unio plezure anoncas la unuafojan organizon de la muzika konkurso „Ora Insulo”. Temas pri konkurso pri porinfanaj kantoj. Ili povas esti en Esperanto aŭ en iu ajn nacia lingvo (aŭ parte en Esperanto kaj parte en nacilingvo), laŭ la intencoj kaj la kreemo de la diversaj aŭtoroj...

Okaze de nacilingva kanto, ja nepras tamen aldoni esperantlingvan „resumon”, kiu klarigu al la publiko la temon kaj la celojn de la kanto (kvazaŭ temas pri faka/akademia artikolo), tiel ke ĝi povos esti komprenata ankaŭ de esperantistoj, kiuj ne parolas la lingvon de la kanto, kaj eventuale tradukata de la organizantoj al diversaj nacilingvoj.

Estus bone, se la kantoj estus aranĝitaj kaj kiel eble plej profesinivelaj. Laŭprefere ili estu kantitaj de unu aŭ pluraj infanoj. Tamen, se tio ne eblas, oni rajtas proponi ankaŭ pli amatorecajn kantojn, kun la akompanado de almenaŭ unu muzikinstrumento (piano, gitaro ktp) kaj eventuale plenkreskula voĉo. La celo estas kolekti ĉiun jaron porinfanajn kantojn el multaj landoj kaj kontinentoj de la mondo.

La limdato por la sendo de la konkursaĵoj (maksimume 2 fare de la sama aŭtoro), kiu estas senpaga, estas la 31-a de marto 2018. Estos premioj pri la plej bonaj tekstoj, muzikaĵoj, samkiel pri la plej inda socia mesaĝo ktp.

La premioj estos por la aŭtoroj kaj NE por la infanoj, kiuj ja ne konkuras unu kontraŭ la alia. La akceptitaj kantoj aperos en disko, kiu estos eldonita kaj tutmonde disdonita en interreto (*iTunes, Spotify, Google Play, Amazon, Deezer* ktp) zorge de la organizantoj sen elspezoj por la aŭtoroj.

Ĉiuj aŭtoroj de la akceptitaj kantoj ricevos poŝte partopren-diplomon.

Se vin interesas ricevi la kompletan regularon kaj pli da detaloj pri la okazaĵo (formato de la kantoj kaj de la tekstoj, daŭro, son-kvalito ktp.), bonvolu sendi retmesaĝon al orainsulo@gmail.com.



Roberto PIGRO

SUMOO

SUMOO estas tradicia japana luktarto. Laŭ la temposkemo de sumoo-ĉampionadoj la japana samideano HORI Yasuo kreis programon por stimuli la legadon. Kaj li brile sukcesas! La ideo estas, ke ĉiu leganto lukta kontraŭ si mem: iu leganto elektas libron kaj decidas, kiom da paĝoj li/ŝi legos ĉiutage dum 15 tagoj. Se la leganto sukcesas, la leganto ricevas diplomon. Tiu programo havas moralan subtenon de ILEI kaj la Ligo aperas sur la diplomoj.

Eble vi ne sukcesos aliĝi al la unua legsesio de 2018, sed aliĝu al la dua kaj al la sekvaj! Mi partoprenis kelkfoje, sed pro miaj multnombraj taskoj mi faris paŭzon. Jen mia kolego HORI vokas. En la mondon venas forta voko... *Karaj dormantaj sumoo-istoj, vekigu! La jubilea 50-a sumoo daŭros de la 14-a ĝis la 28-a de januaro (15 tagoj). Mi atendas vian aliĝon. Kaj varbu viajn amikojn!!! HORI Jasuo (s-ro), 371-0825 Japanio, Gunma, Maebasi, Ootone 2-13-3, <horizonto@water.sannet.ne.jp>*

M.G.

El la landoj kaj sekcioj...

Hungario

Asembleo kaj pedagogia tago de ILEI-HU (19 novembro 2017)



La kunvenon organizis Hungara Asocio de Esperantistaj Instruistoj (EPME), kiu formas la kernon de ILEI-HU. Krom la pridiskuto kaj akcepto de la raportoj pri la pasinta jaro, ni elektis novan estraron por la sekvaj 3 jaroj. Ĉiuj tri estraranoj reelektiĝis: Enikő Sereghy Zengő, Pálma Salomon Csiszár kaj József Németh. La prezidanto de EPME restis József Németh, kiu – laŭ la antaŭaj interkonsentoj – ricevis ankaŭ la sekciestran funkcion.

Post la asembleo sekvis tri prelegoj: Enikő Sereghy Zengő: Uzado de lernolibroj kaj aliaj lerniloj en la instruado; Pálma Salomon Csiszár: Ŝanĝoj en la lingvoekzamena sistemo de Hungario; Attila Kaszás: Revolucio en lingvoinstruado – la dekstra cerboflanka instrumentado. Krome, József Eszényi gvidis diskuton pri la situacio de la Esperanto-instruado en Hungario. La programon partoprenis ĉ. 25 kolegoj.

József NÉMETH

Japanio

Japanaj junuloj lernas Esperanton per komputila ludo

Oni ofte diras, ke motivado tre gravas kiam oni lernas iun lingvon. Ĝenerale japanoj malbone lernas aliajn lingvojn, kaj eĉ Duolingo, pro la angla, malfacile komprenebla por japanoj, ne tiom bonvenatas kaj uzatas ĉi tie por lerni Esperanton. En la lasta aŭgusto aperis en Japanio nova komputila ludo titolita „Kotonoha Amrilato”, kiu uzas Esperanton. En ĝi, junulino hazarde trafas al mistera mondo, kie ĉiuj parolas iun strangan lingvon nomatan „Juliamo”. Tiu „Juliamo” fakte estas Esperanto. Ŝi renkontis ĉarman knabinon tie. Por amikiĝi kun tiu knabino, ŝi ne havas alian eblon ol eklerni la lingvon. Ludante, la ludanto efektive lernas Esperanton. Simpla motivo, ke *mi* volas kompreni kion *ŝi* diris, nature gvidas la ludanton al plia lernado. Post la apero de la ludo, tute neatendite multe vendiĝis lernolibroj de Esperanto, fondiĝis kelkaj lernantogrupoj en supermezlernejoj, kelkaj aliĝis al la ekzameno de Japana Esperanto-Instituto (JEI) kiu okazis en la Japana Esperanto-Kongreso novembre. Tia fenomeno fakte superas nian imagon. Kelkaj junuloj eĉ ĉeestis en la Zamenhofa Festo kaj restas en Esperantujo. En la fino de decembro aperis varianto de la ludo por saĝtelefonoj, kaj certe plimultiĝos ludantoj. Kvankam ni komprenas la gravecon utiligi novan teknikon por instrui Esperanton al junuloj, ni mem ne povis oferti tian ludon. Feliĉe ĉi-foje iu produktoro, kiu jam de lerneja tempo havis intereson pri Esperanto, efektivigis komercobaze la ludon, kontrolitan de JEI. Laŭ li, eĉ li mem ne imagis, ke junuloj tiom entuziasmiĝis pri Esperanto.



Ŝajnas, ke preskaŭ neniu scias E-on, ĝis ili komencis amuziĝi pri „Juliamo”. Per kontaktoj kun la efektiva mondo, kion ili faros? Kun intereso ni rigardas tiun ĉi fenomenon kaj pretas, se bezone, ĉiam helpi ilin.

ISIKAWA Tiekō

<http://sukerasparo.com/>, (© 2017 sukerasparo)

20 kuraĝaj gestudentoj laboras por akiri diplomon de Esperanto-instruisto

Tio eblas pro la EIT-programoj lanĉitaj de ILEI en novembro 2017. EIT = Esperanto Instruista Trejnado. Por la kurso kun ĉeesta semajno en Madrido en julio aliĝis kaj eklaboris dek personoj. Por la kurso kun ĉeesta parto en Kotonuo en novembro aliĝis kaj eklaboras dek personoj. Ili ĉiuj studas per la Reto sub la gvidado de d-ino Katalin Kováts.

Reta Instruista Trejnado de Esperanto (RITE) estas la unua parto. Lecionoj pri gramatiko kaj metodologio atingas la nombron 40. Teorio legenda kaj lernenda, poste sekvas testo kaj hejmtaskoj. Do tre serioza laboro. La gvidantoj taksas, ke la gestudentoj devas dediĉi proks. 6 ĝis 8 horojn semajne al tia studado. Pro tio mi elektis la titolon „kuraĝaj gestudentoj”.

En Madrido okaze de la ILEI-kongreso la dekpersona grupo studos intense, instruos ekzemple kaj ekzameniĝos.

En Kotonuo inter la 4-a kaj la 11-a de novembro la afrika grupo tute same studos intense, instruos ekzemple kaj ekzameniĝos. Ili



povos kunveni en Benino, ĉar ne estos problemoj pri vizoj. Por tiu tre grava renkontiĝo la movado devas kompreni, ke tiuj afrikanoj ne sukcesos mem pagi la vojaĝon kaj la restadkostojn. Pro tio ni jam nun petas, ke vi faru donacon al la



SCIO SEN BARILOJ

IPR 18/1 > 32

organizanto „Scio Sen Bariloj” (SSB) aŭ per donaco por subteni precizan personon aŭ por subteni la eventon ĝenerale. Pri „Scio Sen Bariloj” vi povas informiĝi en Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Scio_Sen_Bariloj. La UEA-konto de SSB estas assb-k. Mi mem gvidos tiun gravan semajnon en Benino. Aliĝis tri personoj el Benino, 3 el Burundo kaj po unu el DR Kongo, Senegal, Ganao kaj Togolando.

Mireille GROSJEAN, Prez de ILEI

AMO – ĉe viv-eko aŭ viv-daŭrigo?

Populara diraĵo tekstas: „La vivo komenciĝas ĉe kvardek.” Oni povas diskuti senfine tiun tezon, sed certe tio ne validas por la AMO-programo de UEA. Ĝi rapide kreskis, en 2014 tra infanaĝo, en 2015 preterire de la adoleksa fazo, en 2016 ĝi maturiĝis al plenkresko. En 2017, kun 12 seminarioj en 11 landoj: el tiuj 5 novaj: Barato (Hinda Unio), Kartvelio, Korea Respubliko, Rusio kaj Svislando, ĝi jam atingis tiun proverban mezaĝon. Pri AMO en 2017 vidu la revuon *Esperanto*, januaro 2018, p. 6 kaj 7.

Apartaĵo de 2017 estis la unuafoja trakto de edukaj temoj – ĝis nun AMO intence evitis okupiĝi pri instruista trejnado, opiniante, ke tiun tiom specialigitan temaron pli oportune traktas ILEI. Tio veras, sed estas multo por diskuti kaj trakti en la eduka kampo, kiu ne rilatas rekte al instruista trejnado. AMO 33 en Grezijono estis organizita komune de UEA kaj ILEI, same okazis en AMO 35, AMO-LIMA en la plej okcidenta piedfingro de Svislando en la vilaĝo Les Brenets, kun Francio en piedira distanco. Jam la tria eduktema AMO, numero 38, okazis kadre de la 50a Kongreso de ILEI en Busano, Koreio.

En 2018 la programo impetas antaŭen al sia kvindeko:

AMO 42 en Novjorko (sabaton la 27-an de januaro 2018) pri eksteraj rilatoj, kun aparta fokuso pri Unuiĝintaj Nacioj.

AMO 43 en Havano (meze de februaro) kadre de la 9a Tut-Amerika Kongreso.

AMO 44 en Moskvo (en februaro 20-21a) tuj antaŭ APERO-12.

AMO 45. ĵus anoncita, en Marakeŝo, Maroko (apr.1-3), kadre de la 11a Mezorianta Kunveno.

Pendas petoj el Burundo, Benino kaj Slovakio – kadre de KAEST 2018 novembre. Ekcirkulas scivolo – kie okazos la 50a AMO?

Stefan MACGILL, Hungario



La 7-a Tutmonda Ekzamentago okazos la 16-an de junio 2018.
Ankaŭ aliaj datoj jam estas konataj kaj elekteblaj.
Informiĝu kaj petu sesion ĉe
<http://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>

Ekparolu! okazigis 850 parolsesiojn

2017 estis la unua plena jaro por la programo Ekparolu! La retejo edukado.net funkciigas ĝin helpe de spertaj esperantistoj, geonkloj, por ebligi parolekzercojn por komencintoj, t.e. genevoj.

En 2016 eksperimentale la geonkloj donis 150 fojojn 30-minutajn sesiojn. En la unua plena jaro, en 2017, okazis precize 700 sesioj. En la projekto partoprenis 103 genevoj kaj 58 geonkloj, entute el 41 landoj. El la 58 ekzameniĝintaj kaj aprobitaj geonkloj 52 havis la oportunon doni parolsesion en 2017. El inter ili **Jean-Jacques Wintraecken el Nederlando, kun 68 parolsesioj, estas la absoluta ĉampiono.** Ankaŭ ĉi-loke ni dankas la ĝisnunajn geonklojn, kiuj dediĉas multe da tempo por helpi la komencintojn. **La 25 plej diligentajn vi povas vidi sur la sekvapaĝa foto.**

Jam 35 genevoj finis siajn studojn kun 10, kelkfoje 20, kaj eĉ unufoje kun 30 sesioj. La enketiloj, kiujn ili plenigas post la studoj, indikas, ke la parolebloj, kiujn la kunlaborantoj disponigas, estas vere utilaj kaj por multaj la solaj okazoj por ekzerci sin en la parolado.

La plej multaj komencintoj venas el Usono, sed ankaŭ eŭropaj novlernintoj amase turnas sin al *Ekparolu!* por helpo. La plimulto el ili post sia ekzercoserio restas en la Ekparolu-grupo ĉe Facebook, kaj daŭre kontaktiĝas kun la anoj de la komunumo. La celo helpi la enmovadiĝon de la novuloj en multaj okazoj efektiviĝas. Estus tre bone, se kursgvidantoj instigus siajn lernantojn aliĝi al la programo kaj havi konversaciojn kun diversnaciaj geonkloj. Dum la ĉeestaj kursoj eblus raportigi la kursanojn pri siaj spertoj kaj pri la informoj, kiujn ili sukcesis akiri dum la parolsesioj.

Por la programo edukado.net daŭre atendas spertajn esperantistojn, kiuj post mallonga reta trejnado volonte babilos kun komencintoj skajpe. Kun novaj geonkloj kaj genevoj ni esperas por 2018 almenaŭ 1000 parolsesiojn
Por pliaj informoj bv. legi la paĝon www.edukado.net/ekparolu

Raportis: Katalin KOVÁTS, ĉefonklino



onklo

[Jean-Jacques Wintraecken](#) ^{of} (NL) 68 sesioj - [Atestilo](#)



onklino

[Anjo Amika](#) ^{of} (HU) 54 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Raffaele](#) ^{of} 44 sesioj - [Atestilo](#)



onklino

[Jannick Huet](#) ^{of} (FR) 43 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Johan Darks](#) ^{of} (Serbio) 34 sesioj - [Atestilo](#)



onklino

[Irina Goncharova](#) ^{of} (RU) 34 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Peter Weide](#) ^{of} (Saliko) DK, 33 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Hoss Firooznia](#) ^{of} (US) 24 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Miroslav Vančo](#) ^{of} (CZ) 19 sesioj - [Atestilo](#)



onklino

[Françoise Noireau](#) ^{of} (FR) 19 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Mariusz Hebdzyski](#) ^{of} (PL) 19 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Stephan Robert](#) ^{of} (FR) 18 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Doniben J. J.](#) ^{of} (CO) 18 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Matthew Smith](#) ^{of} (AU) 14 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Didier](#) ^{of} (FR) 14 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Claude Labetaa](#) ^{of} (FR) 14 sesioj - [Atestilo](#)



onklino

[Katalin Kováts](#) ^{of} (NL) 14 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Mikaelo Čertlov](#) ^{of} (RU) 13 sesioj - [Atestilo](#)



onklino

[Vida Kulikauskiene](#) ^{of} (LT) 13 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Thierry TAILHADES](#) ^{of} (FR) 12 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Peru Amorrotu Barmenebea](#) ^{of} (Katalunio) 12 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Jorge Rafael Nogueras](#) ^{of} (US) 11 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Piet Glorieux](#) ^{of} (BE) 11 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Julien Becan](#) ^{of} (FR) 10 sesioj - [Atestilo](#)



onklo

[Austin Brake](#) ^{of} (US) 10 sesioj - [Atestilo](#)

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Rob Moerbeek.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Goro Kimura, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsejnoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsofia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Arina Osipova**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leyster Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Rerezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr, **Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas **10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj**. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan *IPR* kaj paperan *Juna Amiko*. Tio kostas por A-landanoj **32 EUR kaj por B-landanoj 18 EUR**. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, jozefo.nemeth@gmail.com, www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, <moerbeekr@gmail.com>.

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de januaro 2018,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aprilo 2018.**

SEKCIOJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl SELIMI,
Rruga Fortuzi, nd.9, h.1, ap. 3,
AL-1016 Tirana,
bselimi@gmail.com

Aŭstralio: Jennifer BISHOP,
24/8 Wallen Rd, Hawthorn,
AU-3122 Victoria,
bishop.jennifer699@gmail.com

Belgio: Marc CUFFEZ,
Elisabethlaan 295,
BE-8400 Oostende,
flandrio@hotmail.be

Benino: ALOFA Jérôme
Charles, 04BP0672
BJ-Cotonou, Rep du Benin,
alofkarlo@yahoo.fr

Brazilo: Aristophio Andrade
ALVES FILHO,
Rua B-55, N° 85, Conj. B.
Bentes 1, Q. B-55, Benedito
Bentes, Maceió, AL, Brasil,
BR-57085-748,
esperantomaceio@yahoo.com.br

Bulgario: Mariana
GENCHEVA, Targovska 95,
BG-5180 Polski Trambesh,
maries972@yahoo.com

Burundo: Jérémie
SABIYUMVA, BP 170,
BI-Rumonge-Burundi,
ane_bur@yahoo.fr

Ĉeĥio: Jana
MELICHÁRKOVÁ, Polní 938,
CZ-696 02 Ratiškovice,
melicharkova@quick.cz

Ĉinio: GONG Xiaofeng,
School of Environmental and
Chemical Engineering,
Nanchang University,
CN-330031 Nanchang,
arko.gong@qq.com

Danio: Ileana SCHRØDER,
Vestavej 4, DK-2770 Kastrup,
ileana.schroder@mail.dk

Finlando: Sylvia
HÄMÄLÄINEN,
F.E. Sillanpään katu 2 C 46,
FI-33230 Tampere,
sylvia.h@kolumbus.fi

Francio: Michel DECHY, 65
allée de la Crémaillère,
FR-59650 Villeneuve d'Ascq,
michel_dechy@hotmail.com

Germanio: Zsófia KÖRÖDY,
Esperanto-Centro,
Grubenhagenstr. 6,
DE-37412 Herzberg/Harz,
zsofia.korody@esperanto.de

Hispanio: Luis Eduardo
BERDOR REMON, Pablo
Iglesias 41, 4 B,
ES-50018 Zaragoza,
eduardo.berdor@gmail.com

Hungario: József NÉMETH,
Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász,
jozefo.nemeth@gmail.com

Irano: Ahmad Reza
MAMDUHI, Nr. 9 K. Iraj, Kh.
Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-
Afshar, Kh. Vahid Dastgerdi,
IR-19166-13514 Tehran,
mamduhi@gmail.com

Italio: Luigia OBERRAUCH
MADELLA, via Prampolini 8,
IT-43100 Parma,
silkovojo@aliceposta.it

Japanio: ISIKAWA Tiekō,
Tate 1-6-6-103, JP-353-0006
Siki-si, Saitama-ken,
tiekosanjo_103@bj8.so-net.ne.jp

Katalunio: Rubén
FERNÁNDEZ ASENSIO.
C/ Latrilla 12, 1r 2a, ES-08912
Badalona, *ileicat@hotmail.com*

Kongo DR: MAFUILA
MAVOMO Jackson,
C/O DKEA, BP 1007 Kin
Limete Congo RDC,
mavomespero@gmail.com

Korea Resp.: PARK
Yongsung, 110-dong 902-ho,
Daewoo Ian Apt. Samke-dong,
Gimhae Si, Gyeongsangnam-
Do, KR-621-750,
esabpark@korea.com

Kroatio/KEL: Marija
JERKOVIĆ, Jarunska 6,
HR-10000 Zagreb,
mjerkovic@net.hr

Kroatio/KEU: Svijetlana
AKIK, Franje Malnara 52,
HR-10000 Zagreb,
ilei@hes-keu.hr

Kubo: Gonzalo
COLLANTES GARCIA,
N.López 857 (altos) e/ Barnada y
S.Lora.
CU-90100, Santiago de Cuba
eduardo.robort@infomed.sld.cu

Meksiko: Carlos
HERNÁNDEZ LOARCA, Arco
del Triunfo 2019-40 San Pedrito
los Arcos,
MX-76148 Querétaro México,
ilei@esperanto-mexico.org

Mongolio: Khorloo
TSERENDEJID, MN-
Ulanbatoro, distrikto BZD, 82-5,
tserenjdjd@yahoo.com

Nederlando: Robert
MOERBEEK,
Zwaansmeerstraat 48,
NL-1946 AE Beverwijk,
moerbeekr@gmail.com

Nepalo: Bharat Kumar
GHIMIRE, Nepala Esperanto-
Asocio, G.P.O. Box 10518,
Kathmandu,
nespa_bharat@hotmail.com

Norvegio: Anne Karin
BONDHUS, Morenefaret 8A,
NO-4340 Bryne,
akbondhus@jkn.no

Pollando: Magdalena
TATARA, ul. Grzegórzecka
74/4, PL-31-559 Kraków,
mtatara@gmail.com

Rumanio: Mihai TRIFOI, Str.
Principală, Bl.1 Ap.3, RO-
527116 Bixad/Jud. Covasna,
mihaitrifoia@yahoo.com

Serbio: Radojica PETROVIĆ,
Bul. oslobođenja 36, RS-32000
Čačak,
radojica.petrovic.rs@gmail.com

Suda Afriko: Emile MALANDA
NIANGA, PO BOX 2787 ZA-Cape
Town, *emalandan@yahoo.fr*

Svedio: Agneta
EMANUELSSON, Carl Ugglas väg
6, SE-641 37 Katrineholm,
agneta.emanuelsson@fro.se

Svislando: Charles RODUIT, rue
de Chancheri 1, CH-1661 Le
Paquier, *charles.rouit@gmail.com*

Tanzanio: Mulele Samwel
MBASSA, Box 25, Bunda -
Tanzanio. Poštel: +255786 819 767,
+255758 176 722,

mulelembassa@gmail.com

Togolando: ATTIOGBE-
AGBEMADON B., Mensah, B.P.
39, Aneho, TG-Lomé,
abiovamensah@yahoo.fr

Ukrajnio: Nina DANYLYUK,
pr. Sobornosti, 32, Log. 108 UA-
43026 U. Lucjck

Usono kaj Kanado: Ronald
GLOSSOP, 8894 Berkay Avenue,
US-63136-5004 Jennings, MO,
rglossop@mindspring.com

Vjetnamio: Ngyuyen THI NEP,
70, B20A, Kim Lien, Dong Ha,
VN-Hanoi,
Nguyennepa9cfl@gmail.com

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida ELBAKJAN,
Moldovakan 26/2, kv.52, AM-
375062 Erevan,
Lidaelb@yahoo.com

Britio: Elizabeth STANLEY,
Frome House, Frome Gardens,
Stroud, Glos. GL5 4LE, UK,
elistaros@hotmail.com

Ĉilio: Héctor CAMPOS GREZ,
Casilla 903, CL-3340000 Curico,
hecg@uea.org

Ganao: Alfred Kobina
ARTHUR, P.O. Box TS 404,
Teshie, GH-Accra,
abaako43@yahoo.com

Islando: Loftur MELBERG
Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-
221 Hafnarfjörður,
lofturmsig@yahoo.de

Israelo: Luiza CAROL, P.O.Box
1083 Kiriat-Yam IL-29109,
luizac@012.net.il

Niĝerlando: BOUKARI Elias
Illiassou, S/C de Kanguéy BP11936
Niamey, Niger, *eliasdj@gmail.com*

Pakistano: Adeel Mahmood
BUTT, Ward No. 11, near M.C.
High School, PK-39100 Nankana
Sahib, *adeelbutt84@gmail.com*

Rusio: Svetlana SMETANINA,
str. Budajskaja 13-35, RU-129128
Moskvo, *svsmetanina@yandex.ru*

Senegalo: Assane FAYE, BP
1186 Rufisque, Senegal,
damanemanu2000@yahoo.fr

Slovakio: Magdaléna
FEIFIČOVÁ „Fejfi“, A. Bernoláka
25/5, SK-010 01 Žilina,
esperanto.fejfi@gmail.com

Tajvano: Reza KHEIRKHAH,
Chung Ching Road, No. 105, TW-
Pingtung city, 900-73,
rezamenhof@yahoo.com

Urugvajo: Sonia RISSO, Pascual
Costa 3253 Apto 1215, UY-11700
Montevideo, *sonry@adinet.com.uy*

KONTAKTPERSONOJ

Argentino: Gabriel Enrique
WAGNER, Misiones 1421, AR-
3116 Crespo - Entre Rios,
gwagner@digitaloffice.com.ar

Aŭstrio: Uwe STECHER,
Zaunscherbgasse 3/3/6, AT-1210
Wien, *punktor@live.at*

Bolivio: Leandra DIA RIOS,
Calle María Estívariz No 290,
Avenida Coronel Valdez Pasaje
Zaratustra, Villa Pabón, Zona
Central, *mileis_7@hotmail.com*

Bosnio kaj Hercegovino:
Nimeta KULENOVIĆ, Branica
Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Haitio: Christine THEANO,
Christ-Roi, Imp. Romane # 41,
HT-6110 Port-au-Prince,
christinetheano@hotmail.com

Indonezio: Ilia Sumilfia DEWI,
Perumahan, Pejuang, Pratama,
Blok L, no. 11, RT/RW 003/006,
ID-Bekasi, Jawa Barat,
ilia.dewi@gmail.com

Kenjo: Gilbert S. SIKALA,
Chemomi Estate, P.O. Box 22,
30301, Nandi Hills,
simiyugilbert@yahoo.com

Kostariko: Hugo MORA
Poltronieri, Apartado 4981, CR-
1000 San José,
tikoguau@gmail.com

Litovio: Gražina OPULSKIENĖ,
Obuoliuko 42, Mažeikiai LT-
89312, *grazopul@yahoo.com*

Luksemburgo: Claude
NOURMONT, 2 om Kläppchen,
LU-5682 Dalheim,
moonmont@pt.lu

Nikragvo: Uriel GURDIAN,
Rpto. Shick 2da etapa, Iglesia
adventista 1c O, 1c N. Casa G-32,
Managua, Nicaragua,
esperantonica@gmail.com

Portugalo: Luís LADEIRA,
Rua Manuel Valadares, 10, 2E
PT-2650-192 Amadora
luisladeir@gmail.com

Slovenio: Peter GRBEC, Sv.
Peter 142, SI-6333 Sv. Peter,
peter.grbec@gmail.com

Srilanko: U.L.F.G.Zeiter
PERERA.197, Indivitiya Road,
Hettigama, Jaela, Srilanka,
zeiter.espero@gmail.com

Taĝikio: Firdaus SHUKUROV,
Glavpochtamt, a.k. 135 TJ-734000
Dushanbe, *komintel@yandex.ru;*
aet2005@yandex.ru

Turkio: Vasil KADIFELI,
Ataturk mah. Turgut Ozal blv.
Gardenya 2-1 D:21 Atasehir 34758
Istanbul/Turkey,
vasilkadifeli@gmail.com

Venezuelo: Asociación
Venezolana de E-o, Ricardo
Coutinho, Apartado postal 47675,
Caracas 1041-A, VE,
venesperanto@cantv.net

NEPRE registru viajn
kursojn
en la KURSEJO de
www.edukado.net!

NEPRE raportu al ILEI
pri via aktivado
en la kampo de
instruado de Esperanto!

Tiuj informoj estas
atutoj
por informi kaj konvinki
la eksteran mondon.